Carl Riedel,

# Kommet, ihr Hirten

Kommet, ihr Hirten,
Ihr Männer und Fraun!
Kommet, das liebliche
Kindlein zu schaun!
Christus, der Herr,
Ist heute geboren,
Den Gott zum Heiland
Euch hat erkoren.
|: Fürchtet euch nicht! :|

Lasset uns sehen
In Bethlehems Stall,
Was uns verheißen
Der himmlische Schall!
Was wir dort finden,
Lasset uns künden,
Lasset uns preisen
In frommen Weisen.
|: Allelujah! :|

Wahrlich, die Engel
Verkündigen heut
Bethlehems Hirtenvolk
Gar große Freud:
Nun soll es werden
Frieden auf Erden,
Den Menschen allen
Ein Wohlgefallen.
|: Ehre sei Gott! :|

. . .

Carl Riedel,

# Venu, paŝtistoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Venu, paŝtistoj,
Vi homoj al ni!
Venu kaj vidu
La filon de Di'!
Kristo hodiaŭ
Por vi naskiĝis,
Via Savanto
Li elektiĝis.
|: Ne timu vi! :|

Venu rigardi
Vi tion kun ni,
Kion promesis
Ĉiel-melodi'!
Kion vi trovos.
Ni diskonigu,
Kaj la Sinjoron
Ni honorigu!
|: Haleluja! :|

Estas ĝojego
Por la paŝtistar',
La sciigaĵo
De la anĝelar':
Inter la homoj
Nun iĝu paco
Kaj sur la tero
La Dia graco.
|: Al Di' honor! :|

. . .

Carl Riedel,

# Aŭdu, paŝtistoj

*tradukita de Albrecht Kronenberger*

Aŭdu, paŝtisto,
mi diras al vi
Bonan sciigon
pri l' Filo de Di':
Enkarniĝinta,
ĵus naskiĝinta,
Ĉirkaŭvindita,
entrogigita.
Gloron al Li!

Vidu, homidoj,
la amon de Di'.
Malsupreniris
la Vorto por vi.
Kruce murdota,
entombigota,
Resurektonta,
ĉiel-ironta.
Gloron al Li!

Venu, kristanoj,
rapidu al Li,
Kiu bebiĝis
en stalo por vi.
Miru ĝojante,
kore kantante,
Genufleksante,
Lin adorante.
Gloron al Li!

. . .

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Carl Riedel *(∗1827-10.05 – †1888-06-03).*

*Arg-565-1139 (2012-12-26 14:08:58)*

*Vidu ankaŭ la retejon* http://ingeb.org/spiritua/kommetih.html *kaj la muziknotojn jen:* http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038. *Aŭdeblas la melodio jen:* http://ingeb.org/Lieder/kommetih.mid. *Vidu ankaŭ:* http://www.lieder-archiv.de/kommet_ihr_hirten-notenblatt_200038.html.

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de* Carl Riedel *(∗1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982.*

*MR-014-3 / Arg-565-1140 (2010-09-20 10:01:32)*

*La muziknotojn vidu jen:* http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038.

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de* Carl Riedel *(∗1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de* Albrecht Kronenberger *(∗1940-01-21) en 1990.*

*Arg-565-1142 (2010-09-20 11:11:28)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la retejo* http://reocities.com/cigneto/thctxt/a/auxdupasx1.html.